

EKO 2021

Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok
jaroj, de post 2013
2020: rekorda jaro:
kun 60 komunikoj
Subtene al la loka,
landa, faka kaj
regiona agado

EKO 2021-44 sendita el Budapeŝto la 15an de oktobro

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

TEJO progresis ĉe UN

Post longa klopodado, TEJO ricevis **Specialan Konsultan Statuson** ĉe **Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj** (EKOSOK) pere de kiuj ne-registaraj organizoj (NRO-j) estas reprezentitaj ĉe UN-instancoj.

Ĝis nun TEJO kaj junaj esperantistoj povis atingi Unuiĝintajn Naciojn (UN) nur pere de UEA, kiu ankaŭ ricevis la konsultan statuson en 1998. TEJO nun estas ankaŭ reprezentita memstare kaj kune kun UEA reprezentas Esperanton kaj la esperantistaron. Konkrete, tio faciligos la aliron de TEJO al UN-eventoj kaj kunsidoj kie NRO-j estas invitataj, kaj tie defendi la poziciojn de TEJO.

TEJO nuntempe strebas strukturi sian agadon ĉe UN, varbante kaj trejnante novajn aktivulojn por agadi ene de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER), partnere kun UEA.

UEA kaj la Virtuala Kongreso

La prelego de Klaus Leith dum la 2-a VK jam estas en UEA viva:

<https://youtu.be/RlfiXW1ivzE>

Servo subtenata de
Universala
Esperanto-Asocio
kaj Internacia Ligo
de Esperantistaj
Instruistoj



Helpantoj:
Rob Moerbeek
Gbeglo Koffi
François
Lo Jacomo

ENHAVO

- TEJO kaj UN
- Klaŭse en UEA Viva
- Eŭropaj diskutoj
- Afrikaj filmoj
- Revuoj tra Eŭropo

Eŭropaj diskutoj registritaj en Germanio

Oni bonvolu subteni la komunan kampanjon per sia voĉdonado, pri kiu ni jam raportis.. Certe utilas rondletero al homoj, krome ankaŭ povas utili meti informon pri la kampanjo al via retpaĝo, vidu la ekzemplon ĉe Germana Esperanto-Asocio sur <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/esperanto-en-eu> (Esperanto-versio) kaj <https://www.esperanto.de/de/europa> (germana versio)

Jen ekzemplo sur la paĝo de regiona asocio, Baden-Virtemberga Esperanto-Asocio <https://esperanto-bw.de/pages/de/landesverband/eu-zukunftskonferenz.php>

Afrikaj filmoj subtenindaj

La Afrika Komisiono de UEA daŭre donas subtenon por kreo de Esperanto-filmoj. Gilbert Niyukuri, vickunordiganto de la komisiono, kiu daŭre ĝuas ankaŭ bonan laborrilaton kun siaj kolegoj, ĵus produktis ĉ. 4-minutan filmon en kiu oni vidas infanojn flue paroli Esperanton. Bv. mem spekti kaj ŝati la filmon per <https://www.youtube.com/watch?v=JYwodaBmlnk>

Afrika Komisiono intencas pliigi film-agadojn, por kiuj, tamen, financa subteno de vi kaj de viaj organizaĵoj restas nepra al la konto Afriko ĉe UEA.

Adjévi Adjé

Benelukso pripensas Eŭropon

Dum la Beneluxsa Kongreso en Karloreĝurbo (Charleroi, Belgio), ankaŭ estis prezentita la UEA/EEU-kampanjo rilate al la eŭropunia "Konferenco pri la estonteco de Eŭropo". Ĉirkaŭ dudek kongresantoj, inter ili aktivuloj de landaj asocioj, ĉeestis la prezenton kaj starigis demandojn. Kio estas la EU-Konferenco? Kiel ĝi funkcias? Kiel esperantistoj partoprenu la civitanan konsulton de la konferenco? Kiamaniere tio povas antaŭenigi Esperanton en EU? Tiuj estis la temoj pritraktitaj dum la unuhora prezento, kies registraĵo troviĝas en jutubo:

<https://www.youtube.com/watch?v=VLGtwcNuVAE>

Laŭ la takso de UEA/EEU kaj landaj Esperanto-asocioj en EU indas uzi la eblojn influi lingvopolitikan debaton, kiujn donas al ni tiu konferenco. Ties elemento de civitana konsulto, aplikata la tutunan fojon en tiu speco de EU-konferencoj, ebligas nin plividebligi nian lingvon en eŭropuniaj politikaj kaj publikaj cirkloj: grandnombra apogo de por-esperantaj civitanaj proponoj almenaŭ paroligos pri niaj ideoj. Kvankam la ŝancoj de realigo, specife de la plej ambiciaj el ili, estas ne jam tre verŝajne, seriozan debaton la kutimaj skeptikuloj kaj kontraŭuloj en eŭropuniaj institucioj ne povos malhelpi. Tamen kondiĉo por



sukcespromesa traktado de por-esperantaj proponoj estas, ke tiuj fakte estu apogitaj de multaj partoprenantoj en la konferenca reta platformo. La proceduro de registriĝo kiel partoprenanto estas iomete teknike malfacila, do foje partoprenemuloj ne rapide sukcesas kaj perdas la paciencon. Helpon ofertas la aktivuloj de la UEA/EEU-kampanjo (retpoŝte EU-kampanjo@gmx.eu).

Ĝis nun ni sukcesis nur instigi malgrandan parton de la organizitaj esperantistoj en EU al partoprenado. Per la aktiva, daŭra kaj repetita informado kaj varbado de landaj asocioj ni espereble atingos pli bonajn rezultojn. Por-esperantaj proponoj jam apartenas al la plej multnombre apogitaj ideoj rilate diversaj temoj kaj jam altiris sufiĉe multajn subtenantojn. Kompleta listo de tiaj proponoj troviĝas en https://uea.org/vikio/Konferenco_pri_la_estonteco_de_Eŭropo (kie UEA/EEU disponigas ĉiujn utilajn, daŭre ĝisdatigitajn informojn kaj konsilojn rilate al la Konferenco).

Pollando, Rusio, Slovenio – indaj revuoj

Jen la kovriloj de du bonvenaj revuoj, kiuj daŭre aperas.



La slovena revuo (dekstre) informas pri paroliga rondo en la Intergeneracia centro Kranj gvidata de Gregor Markič. Nova reta kurso de Esperanto »Maribor« por komencantoj komenciĝos en decembro: gvidos Peter Grbec. Okazas pluraj pliaj kursoj. Laŭdinda agado por altiri novajn esperantistojn!

Pliaj rezultoj de Belartaj Konkursoj

La kantoteksto "Ekas la nokto" ricevis la unuan premion en la Belartaj Konkursoj de UEA 2021. La premio... tiu kantoteksto fariĝis aŭskultinda kanto...:

https://youtu.be/i50mqj_xyRY

mga

===== vortoj: 665 =====

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikiloj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikiloj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

ALDONU VIN: Skribu al stefan.macgill@uea.org. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.